

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 94, Januaro 2018

Aranĝoj

AMO Seminario

INVITO al la SEMINARIO “AKTIVULA MATURIGO-44”

Estimataj samideanoj, karaj geamikoj!

La **20-22.02.2018** en la apudmoskva bazejo “Jerŝovo” okazos unika E-aranĝo: Seminario “Aktivula Maturigo - 44” (AMo-44). La aranĝon organizas Rusia Esperantista Unio kaj Moskva Esperanto-Asocio MASI sub la aŭspicio de Universala Esperanto Asocio. La temo de AMo-44 estas tre grava kaj aktuala: “**Junigo kaj modernigo de la Esperanta Movado en Rusio**”.

Dum kelkaj, espereble, ne tre malvarmaj vintraj tagoj en agrabla amika etoso ni kune pridiskutu la nunan staton de E-movado en Rusio kaj serĉadu la vojojn por vigligi kaj progresiĝi ĝin.

Nia kara gasto, vicprezidanto de UEA **Stefan MacGill** startigos la aranĝon. Li klarigos al ni, kio estas AMo-Seminarioj kaj gvidos FLAMon — unu el la gravaj programeroj, kiu helpas al ni sistemigi la Fortojn, Lamaĵojn, Avantaĝojn kaj Mankojn de Rusia Esperantujo. REU-estraranoj kaj rusiaj aktivuloj okazigos prelegojn, diskutrodojn, parolajn klubojn, debatojn, spertinterŝanĝojn, konsultojn. Novuloj kun sia freŝa organiza sperto helpas kompreni, kiel plani kaj organizi siajn projektojn surloke. Streĉa programo ne lasos vin sidi angule kaj enui. Vi revenos hejmen kun stoko da utilaj ideoj, projektoj, konsiloj kaj nova inspiro por agadi en via klubo, urbo, regiono.

Vesperaj programeroj konsistos el koncertoj, Konkurso de Gajaj kaj Spritaj ludejoj, libera babilado ĉe tea tablo.

Ni bonvenigas ĉiuaĝajn esperantistojn aktive partopreni AMon-44. Venu prelegi, dividi vian sperton, preparoli viajn movadajn problemojn, venu por kune serĉi respondojn al malfacilaj demandoj, krei novajn ideojn kaj interesajn projektojn!



Aliĝu ĉe la paĝo: <http://reu.ru/kalendaro/AMO-Seminario/aliĝilo/>

APERo-12

La Seminarion sekvos la tradicia lingvomergigo de MEA MASI “APERo-12”, kiu daŭros ĝis la 25-a de februaro. Por la partopreno estas invitataj ankaŭ komencantaj kaj progresantaj esperantistoj! Ĉi-foje nia temo estas “Revolucioj” — kaj ĉiuj el vi estas invitataj al kontribuo per plej diversaj seriozaĵoj kaj distraĵoj.

La aranĝoj okazos sinsekve en la bazejo “Jerŝovo”, Zvenigoroda regiono de Apudmoskvo.

Limdato por aliĝo estas la 10-a de februaro.

Por membroj de REU aliĝkotizo por ambaŭ aranĝoj — 600 rbl; nur por AMo — 400 rbl; nur por APERo — 500 rbl.

Antaŭpago por manĝado kaj loĝado (redonebla ĉe neveno) – 1000 rbl.

Antaŭpago por manĝado kaj loĝado (redonebla ĉe neveno) – 1000 rbl.

La aliĝiloj estas en la paĝaro www.reu.ru.

La kotizon kaj antaŭpagon bv sendi al la kasisto de REU Aleksandr Lebedev. Ĉio cetera pagendas surloke al Aleksandr Basov. Ĉiu aliĝinto recevos la duan Informleteron kun konkretigitaj klarigoj.

Bonvenon! Bonvenon! Bonvenon! Bonvenon! Bonvenon! Bonvenon!

*Organiza Komitato de AMo-44
Estraro de REU
MEA MASI*

Aliĝilo por ambaŭ aranĝoj:

La prezoj por ĉiu aranĝo, en la dometo 5 (filialo), loĝado kaj manĝado:

2-3-lita ĉambro (duŝejo kaj necesejo en la koridoro):

AMo: 1370 (20-21.02)+ 1370 (21-22.02)+ 1370 (22-23.02) + 380 (tagmanĝo la 23.02) = 4490

APERo: 1370 (23-24.02)+ 1370 (24-25.02)+ 1370 (25-26.02) + 380 (tagmanĝo la 26.02) = 4490

Suma prezo por la tuta periodo (5 noktoj), inkluzive la antaŭpagojn:

1/ nur por AMo - 4490 rbl + 500 rbl aliĝkotizo

2/ nur por APERo - 4490 rbl + 500 rbl aliĝkotizo

3/ AMo+APERo - 7230 rbl + 700 rbl aliĝkotizo

Aliĝkotizo (500 aŭ 700 rbl) kaj redonebla antaŭpago por loĝado 1000 rbl estas sendendaj anticipite al la sberbanka karto de Лебедев Александр Александрович (kun la noto: Por AMo / Por APERo / Por AMo+APERo):

4276380075080668

Eblas laŭdezire sendi pli da antaŭpaga mono pro loĝado-manĝado.

Grave!!! Bonvolu samtage informi pri la ĝirita sumo kaj ties celo al Aleksandro:

amikko@yandex.ru

<https://vk.com/amikko>

+7-985-385 21 81.

La Unua Bulteno pri RET-2018



Laŭ la decido de REU-Estraro Rusiaj Esperanto - Tagoj en la 2018-a jaro okazos en la eksa bieno de negocisto Neburčilov, nuna ripozejo en pina arbaro ĉe la bordo de la rivero Teza, je kelkaj kilometroj de la antikva urbo Ŝuja en Ivanova provinco.

Datoj: 1-8 de julio 2018 jaro.

Ĉefa temo: "Genaracia stafeto".

La Organiza Komitato estas fondata, pliaj informoj, aliĝilo kaj ĉio cetera sekvos.

Eventoj

Zamenhof-tago en Jalto

Antaŭ la Zamenhof-festo en la centra urba biblioteko okazis vica renkontiĝo de la "Klubo de liberaj vojaĝantoj je nomo de N.Borovko". La renkontiĝo estis jubilea – 25-a: ĝuste antaŭ du



jaroj okazis la unua renkontiĝo kun fama ukraina vojaĝanto Aleksandr Voloŝĉuk. Ĉifoje la gasto estis usona-kanada sciencisto N.O.Ŝamsiev-Trubeckoj, kiu jam 5 jarojn loĝas en Jalto kaj, havante eblecon kompari situacion en Krimeo kaj ĝian prilumon en usonaj amaskomunikiloj, akre

kritikis tiujn.

Antaŭ lia prelego mi, kiel kutime, enkondukis pri jalta E-klubo, pri Nikolao Borovko, la unua direktoro de la biblioteko kaj fama E-pioniro. Sed ĉi-foje mi havis eblecon rakonti ankaŭ pri Zamenhof.

Post la Renkontiĝo esperantistoj venis al montara klubo, kie ilin atendis Zamenhof –busto. Ne ĉiuj klubanoj povis veni, tamen 15 partoprenis.

La kunveno komenciĝis per diplomigo de 3 novaj klubanoj, kiuj finis E-kurson: Diana (kromnomo Klera), Jevgenia (kromnomo Rideto) kaj Matvej (kromnomo Scivola). Cetere, Rideto estis mia kunvojaĝanto en Montara Altajo, kie ni petveturis 3000 km.

Poste kelkaj novaj kursanoj daŭrigis la vesperon. Maria Belenko (filino de Anĵela Belenko), kiu translokiĝis al Jalto el Novosibirsko, legis faman respondon de Zamenhof al letero de N.Borovko. Post ŝi mi kurte rakontis pri homaranismo kaj legis leteron de Zamenhof al la diplomatoj de la mondo. Tuj poste Klera deklamis verson "Preĝo sub la verda standardo". Kaj fine nova kursano Igorj legis en esperanto multajn proverbojn, kiujn li verkis mem. Igorj - nia

valora kursano, ĉar li estas ne nur bardo, sed organizanto de la ĉiujaraj bardaj festivaloj en Jalto. Li certe koncertis.

Mi sciigis gravan novaĵon: ni sendis leteron al la urbestro kun peto nomi unu el la skvaroj "Esperanto" kaj samtempe la saman peton al la urba Popola kontrolo, kiu promesas sukcesigi la aferon. Tio permesus proklami Jalton unu el centroj de pionira E-movado, ĉar en la urbo estas jam du memortabuloj dediĉe al tiuj.

Estis elektita sekretario de la klubo – Anĵela Belenko.

Jefim Zajdman

La raporto estas la lasta, kiun sendis pri sia agado Jefim Zajdman. Kelkajn tagojn post ĝia sendo li pereis. Rigardu sube la nekrologon.



Ekspertado de MVD ne konstatis kulpon de la matematikisto Bogatov pri alvokoj al terorismo.

La fakuloj de ekspert-krima centro de MVD (Ministerio pri Internaj Aferoj) ne trovis pruvojn pri la kulpo de la matematikisto Dmitrij Bogatov, kiun oni akuzas pri alvokoj al terorismo kaj provo organizi amasajn malordojn. Pri tio al TASS komunikis la proksima al la esplorado fonto kaj tion konfirmis la advokato de Bogatov Sarkis Darbinĵan. Li aldonis, ke en proksima tempo la esplorado devas demeti la akuzojn de Bogatov.

<https://tvrain.ru/news/bogatov-455852/>

*Dmitrij Bogatov estas esperantisto, membro de MEA MASI. Dum pli ol 8 monatoj li estas malliberigita pro la menciitaj akuzoj.

Irina Gonĉarova

Novojarsko-2018


Inter 30.12.2017 kaj 05.01.2018 en Tomsko pasis la novjara aranĝo Novojarsko-2018. Ĝin partoprenis 37 personoj: 17 - el Tomsk, 12 - el Krasnojarsk, 4 - el Novosibirsk, po 1 - el Sosnovoborsk (Krasnojarska regiono), Arĥangelsk, Jegorĵevsk (Moskva regiono), Cxelĵabinsk. Partoprenintoj ĝuis bonan etoson de novjara Tomsko, skiis, vizitis gaste lokajn esperantistojn, havis kelkajn ekskursojn: tra la urbo, en la metiejon de la plej fama skulptisto de Tomsko regiono Leontij Andrejeviĉ Usov, Tomskan memormuzeon "Esplora malliberejo de Popolkomisarejo pri Internaj Aferoj (НКВД)" (pri la lasta fiere raportis la muzeo mem http://nkvd.tomsk.ru/media_news/esperantisty-v-muzee/), vd. foton. Ĉiuj partoprenintoj, laŭ la reeĥoj, ĝuis la renkontiĝon.



La lasta adreso de Nikolaj Incertov



Projekto “La lasta adreso” («Последний адрес») estas civitana iniciato, efektivigata en Rusio kaj direkta por eternigo de memoro pri la politikaj reprezaliitoj en Sovetunio. Memore al la viktimo sur la muro de domo, kie loĝis reprezaliito, oni instalas malgrandan ŝildon, dediĉitan al unu homo. Principo de la projekto estas “Unu nomo, unu vivo, unu signo”. La projekton efektivigas nekomerca organizo “Fondaĵo por eternigo de la memoro de viktimoj de politikaj reprezaliitoj “La lasta adreso” laŭ informoj el datumbazo de la societo “Memorial”.



Ekde 1937 ĝis 1939 el la domo 11 laŭ Ĥavsko-Ŝabolovska strateto OGPU-NKVD arestis 24 homojn;

ĉiuj estis mortpafitaj. (Temas pri 15 domoj de la kvartalo kun la sama numero – eksperimenta konstruaĵo en konstruktivisma stilo). Inter ili estis eminenta esperantisto, unu el la gvidantoj de


SEU, dum longaj jaroj ties respondeca sekretario, Nikolaj Jakovlevič Incertov (1896-1937). La aktivulino de la distrikto Inna Drobinskaja, esplorante la aferon, trovis la adreson kaj turnis sin por pliaj donitaĵoj al REU. Dank’ al tio la 28-an de januaro 2018 sur la domo, kie loĝis Incertov, estis instalita koncerna memortabuleto.

La ceremonion partoprenis iniciatintoj de la instalo de la ŝildo, aktivuloj de la societo “Memorial”, esperantistoj (Prezidanto de REU S. Smetanina k.a.) kaj eĉ nepo de N. Incertov, kiu hazarde eksciis pri la afero el interreto. Sonis paroloj pri Incertov, aliaj mortigitoj dum la Granda Teroro, esperantistoj kaj neesperantistoj... Poste oni instalas ankoraŭ unu

memorŝildon sur najbara konstruaĵo – pri latva aktoro R.F. Bancan.

Mi memorigas, ke pli frue, okaze de la 80-jariĝo de la Granda Teroro en la Tago de politikaj reprezaliitoj en la loka muzeo de moderna arto “Galerio sur Ŝabolovka” estis malfermita ekzpozicio pri 5 el la mortigitoj, inter ili pri N. Incertov (vd/ foton). La 28-an de januaro la ekspozicio estis fermata.

Ni eksciis pri la projekto “La lasta adreso” tute hazarde, de la iniciatintoj de la distrikto Ŝabolovskij. Sed nun ni intencas daŭrigi tiun laboron, peni trovi lastajn adresojn de aliaj esperantistoj, pereintaj en tiuj teruraj jaroj, kaj fari memorŝildojn ankaŭ pri ili.



Nikolao Gudskov

Ĉu Esperanto estas neplervalora lingvo? Ne! - diras la sveda gazeto Svenska Dagbladet

Rusa paĝaro **inosmi.ru**, kiu republikigas tradukitajn en la rusan artikolojn el eksterlandaj gazetoj, kiuj ial plaĉis al la redakcio, aperigis artikolon el la sveda gazeto **Svenska Dagbladet** "Ĉu Esperanto estas neplervalora lingvo?" de Mikael Parkvall: <http://inosmi.ru/culture/20180108/241042298.html>

La aŭtoro starigas la demandon: ĉu tiu ĉi internacia lingvo havas iujn mankojn, kiuj malhelpis al ĝi disvastiĝi tra la mondo, kaj faras la konkludon, ke tio estas mito.

Eblas pro diversaj kaŭzoj rilati al Esperanto kun antipatio, tamen tiujn, kiuj asertas, ke tiu ĉi lingvo estas laŭ sia nature mem neplervalora kaj maltaŭga por esprimi tion, kion kapablas aliaj lingvoj, necesas konsideri malpravaj ĝis la momento, kiam ili prezentos pruvojn de la malo.

Certe, agrablas, ke sveda gazeto publikigis objektivan artikolon pri Esperanto, sed des pli agrablas, ke rusa informilo ĝin rimarkis, tradukis kaj republikigis!

Informis Boris Kolker

Nova favora mencio de Esperanto en la centra televido

"Propra ludo" (ruse - "Svoja igra", farita laŭ modelo de Usona ludo "Jeopardy!") estas populara intelekta TV-ludo, aperanta regule ekde 1994 - nuntempe en la kanalo NTV.

Ĝin partoneras pluraj Esperantistoj; la redaktoroj kaj ludgvidanto Pjotr Kulešov sufiĉe multe scias pri Esperanto kaj bone rilatas al ĝi.

En la ludo montrita la 20an de januaro 2018 sonis vica demando rilata al Esperanto (suksese respondita), sekvis aproba komento de la gvidanto.

Se vi ne spektis la ludon en TV, vi povas fari tion iam ajn ĉe la retejo:

<http://svoya-igra.org/2018/01/20/#v>

La demando sonis en la tria rundo, pli proksime al la fino.

Valentin Melnikov

Malnova poŝtkarto sugestis malkovron de ekzisto de Esperanto kaj eĉ aperon de artikolo pri ĝi

Jekaterinburga historiisto Jevgenij Burjakov havis en sia kolekto bildkarton kun kaŝaloto de iu W.N. Webb el Suda Afriko al lia samurbano S.V. Rjabov, sed ne povis kompreni, en kiu lingvo. Finfine iu "poligloto" sugestis, ke estas Esperanto. La historiisto tiom entuziasmiĝis, ke ion pri Esperanto eksciis kaj verkis ilustritan artikoleon pri la afero (kun iom amuzaj eraretoj), kaj publikigis ĝin en populara jekaterinburga revuo "Uralskij sledopyt" kun titolo "Lingvo, esperanta je agnosko" (januara numero de 2018).



Iam en la redakcio de la revuo oni sciis pri Esperanto kaj eĉ kontaktis kun esperantistoj, sed poste venis periodo de silento. Estas bone, ke sur paĝoj de la revuo denove aperis iu mencio, eĉ se bizara, pri nia lingvo.

Informis Ludmila Novikova

Esperanto-instruistoj de Rusio

Mikaelo (Moissej Caleviĉ) Bronŝtejn

Naskiĝdato: la 7-an de julio 1949 en Ĥmelnickij, Ukrainio.

Jaro de esperantistiĝo: samloke, en 1962.

Loĝloko: Tihvino, Leningrada provinco.

Profesio: inĝeniero pri min-elekto, ĵurnalisto.

La gepatraj lingvoj: la jida, rusa, ukraina lingvoj.

Studitaj fremdaj lingvoj: la angla kaj franca lingvoj.

Esperantlingva kaj instruista kvalifikoj: C-diplomo de la internacia KER-ekzameno, Italio, 2010.

Mi komencis lerni Esperanton en septembro 1961, sed kiel la jaron de mia esperantistiĝo mi konscie indikas 1962 – la jaron, kiam mi komprenis, ke mi ne foriros de la esperantista movado. En la 1962-a mi faris la unuajn provojn pri verkado en Esperanto kaj poezia traduko en Esperanton el la rusa kaj ukraina lingvoj. Ricevinte aprobon de mia instruisto, mi entuziasmiĝis kaj



okupiĝas pri ĉio-ĉi ĝis nun, opiniante tion mia ĉefa tasko en Esperantujo.


Instruadon de Esperanto antaŭe mi opiniis deviga tasko, kaj mi faris tion nur pro manko de aliaj instruemuloj en la lokoj, kien min pelis la destino. Tiel do mi instruis en Tula, estante sudento de Politekniko, en Tihvino kaj en Vorkuta, kie mi laboris. Post apero de instrukapablaj kaj emaj instrui personoj mi ĉiuloke transdonis la aferon al ili.

Nun, pro objektivaj kaŭzoj, mi denove restis unusola instrukapablulo en mia urbo Tihvino, do mi instruas. Por pli efika instruado mi verkis du fabelojn: “Mamutido Miĉjo” – por komencantoj kaj “Pri Dinjo, Diko kaj aliaj estaĵoj” – por komencintoj. Surbaze de la unua sperta instruistino Tatiana Loskutova faris lernolibron por komencantoj.

Lastatempe oni kelkfoje invitis min instrui eksterlande. Mi ricevis grandan plezuron de tiu okupo, do mi ne plu opinias instruadon deviga tasko, sed volonte faras tion.

Mikaelo Bronŝtejn

Forpasis Jefim Zajdman



Nin forlasis Jefim Zajdman, elstara esperantisto, gvidanto de Krimea Esperanto-Centro.

La 22-an de decembro vespere li trafis kolizion kontraŭ motorciklo kaj estis grave traumatita. Tutan nokton kuracistoj batalis por lia

sano. La 23-an de decembro matene Jefim forpasis...

Mankas vortoj por priskribi tiun personon, lian karismon, aktivajn, tutan vivon, dediĉitan al Esperanto. Ĉi somere Jefim festis sian 80-jariĝon. Dum la Krimeaj E-Tagoj 2016 ni gratulis lin okaze de lia 60-a esperantistiĝo.

Foriris perfekta gvidoro, instruisto, arda propagandisto kaj entuziasmulo de nia Esperantomovado. J. Zajdman estis iniciatinto, organizinto kaj animo de multaj E-aranĝoj en Krimeo: "Aroma Jalto", "Velura Sezono", pluraj renkontiĝoj ĉe kabo Tarhankut, KET, SAT-kongreso en Jalta (1913) k.a. Al lia senlaca Ĉiama kaj ĝisnuna aktiveco povus envii ĉiu. Vaste konataj estas multaj kantoj, kiujn li tradukis kaj verkis.

Sincerajn kondolencojn al la edzino Anĵela, liaj proksimuloj, disĉiploj, klubanoj, jaltanoj, al ĉiuj, kiuj konis lin.

Vi mankos al ni, kara Jefim!

Dormu en paco!

Sv.Smetanina

Sube troviĝas kelkaj rememoroj pri Jefim, kolektitaj de Pavel Mojajev en la paĝo <https://docs.google.com/document/d/1odqAL44iHW5YSGOJHNbWRJevzbfivZCvsv0iX111CZU/e/dit#> (nur esperantlingvaj rememoroj).

Jevgenia Zvereva-Amis, Ukrainio/Usono/Kanado

Mia unua renkontiĝo kun Jefim.

Estis 2000, la jaro, kiam mi ĵus komencis lerni Esperanton kaj ankoraŭ preskaŭ ne parolis ĝin. Mi iris al mia unua E-renkontiĝo: Aroma Jalto, kaj havis etan akcidenton pri unu el miaj ŝuoj: ĝi bezonis ripareton, kaj mi havis kun mi nek duan paron de ŝuoj, nek gluon por ripari. Krome, estis feritago kaj neniuj vendejoj funkciis tiumomente. Jefim (kiu tute ne konis min tiam) do venigis min al sia hejmo por helpi pri la riparo. Dum li okupiĝis pri la ŝuo, li iom parolis pri iu kanto en la angla lingvo, kiun li volis traduki, sed li ne havis tekston (ankoraŭ ne havante interreton, li do ne povis facile trovi ĝin). Mi tute hazarde konis tiun kanton parkere kaj skribis la vortojn por li sur papero. Post kelkaj jaroj mi revizitis Jalton kaj aŭdis iun kanti tiun kanton, Esperante, en la traduko de Jefimo. Li poste parolis pri la kanto iomete, kaj diris, ke estis iu

vizitanto, kiu skribis la tekston, sed bedaŭrinde li ne memoris, kiu estis tiu persono. Mi diris al Jefimo, ke estis mi, kaj li estis tute surprizita. Li ankaŭ tute ne memoris helpi al mi pri la ŝuo aŭ ke mi eĉ estis en lia domo... Pri kiu kanto temis do? Ve, nun estas mi, kiu tute ne memoras. Vere, vere! :).

Renato Corsetti, Italujo/Britujo

Mi renkontis Jefim-on kelkajn fojojn dum la vivo kaj mi havis kun li tre longajn skajpajn diskutojn ĉirkaŭ la periodo de la eventoj en Ukrainujo antaŭ kaj post la aliĝo de Krimeo al Rusujo. Temis pri vera esperantisto kaj vera homo. Rememore, Renato Corsetti

Vladimir MININ, Rusio/Usono

Post la reveno de Krimeo el Ukrainio al Rusio svisa esperantisto Andreas Kuenzli kompilis 12-personan nigran liston el ukrainiaj kaj rusiaj esperantistoj, kiuj plej multe kulpis por la reveno de Krimeo. En tiu listo estis ankaŭ Jefim Zajdman. Versajne Andreas trotakas la povon de e-istoj en tiu kazo. Andreas dissendis la liston al centoj da plej signifaj (laŭ sia opinio) esperantistoj de la mondo (inkluzive ukrainajn naciistojn-esperantistojn, kiuj okupiĝadis ne pri disvastigo de Esperanto, sed pri disvastigo de la ukraina lingvo).

Jen jam pereis la unua ano el tiu Hi listo - Jefim Zajdman. Se pereis ankaŭ iu alia el la listo, jam ne restos duboj pri komplikeco de Andreas en la pere de Jefim. Mi proponas al la ceteraj membroj de la 12-kapa listo esti singardaj. Mi jam ne memoras ĉiujn el la 12 listanoj. Ĉu eble iu el la 'centoj de plej signifaj esperantistoj' konservis la kompletan liston? Se jes, bv sendi ĝin private al mi. Mi supozas, ke en tiu Hi dissendolisto troviĝas iuj el la plej signifaj e-istoj. :-)

Antaŭdankon!

Kara Dieter Rooke, mi proponas al vi deklari al la svisia polico, ke Andreas Kuenzli eble estas komplico pri la murdo de Jefim Zajdman. Antaŭdankon! Dieter, ĉu vi ofte vidas Andreason en Berno? Mi jam skribis antaŭe averton al Andreas, ke liaj ludoj pri politiko povos finiĝi malbone por li.

Marek BLAHUŠ (Ĉeĥio)

Ĝisosta esperantisto, konvinka varbisto por sia regiono, lerta organizanto de junularaj grupoj kaj eventoj, ĉiam kore junulo, afabla gastiganto por kiu nenio estis problemo, eminenta konanto de Esperanto-historio, kiu sin pro cirkonstancoj sentis eĉ spirite ligita al la pioniroj, kara amiko mortis tagon antaŭ okcidenta Kristnasko. Krimeo perdis en Jefim Zajdman grandan figuron. Nur danke al li ni antaŭ dek jaroj sesope vizitis Krimeon kaj nur pro li multaj longjaraj amikecoj ligiĝis kaj al pluraj homoj ŝanĝiĝis la vivo. Lia animo ripozu en paco!

Tatjana Auderskaja, Odeso (Ukrainio)

Mi konatiĝis kun Jefim en Poltava tendaro, en 1977.

Estis varma aŭgusta nokto, stelplena kaj nigra. Fajreroj de lignofajro flugis al ĉielo. Aliflanke de la lignofajro kontraŭ mi sidis homo, kies vizaĝo estis prilumita de ruĝa flamo. Li kantis.

La melodio estis stranga; la vortoj similis al neniuj el konataj lingvoj. Oni diris al mi, ke estas Jefim Zajdman el Jalta, kaj li kantas antikvajn kantojn en la praa lingvo de hebreejo.

Ĉirkaŭe estis nokto, nenio videblis en mallumo, nenio distingeblis, malaperis ĉiuj limoj, la tempo mem dissolviĝis, kaj ne eblis diri, ĉu antaŭ du mil jaroj, kvar mil jaroj... aŭ nun sonas tiuj kantoj en stranga lingvo? Nokto, fajro, kanto... eterno. Tiu mirinda impres restis ĉe mi ĝis nun.

Poste ni renkontiĝis en "Veluraj Sezonoj", artaj festivaloj, kiujn organizis Jefim. Tio estis unika okazaĵo en Esperanta vivo kaj movado tutmonda, kaj tre domaĝe, ke neniuj ĝis nun verkis, almenaŭ skize, la priskribon de tiuj eventoj. Ĝenerale, la Esperanta vivo en Sovetunio en 1970aj-1980aj jaroj estis unika, nenie aliloke trovebla en tia alta kaj intensa grado. Iam okazis

UK kun la ĉeftemo: “Esperanto – ĉu valoro aŭ varo?” Por mi ne estis demando: certe, valoro, se oni mem kreas ĝin, kaj varo – se nur konsumas. Sed ĉu eblas por la nuna “civilizita homo” krei? Tion faras specialaj personoj, kiuj ricevas pro tio monon; sed la afero de simpla civitano estas nur konsumi! Kaj al Esperanto ili venas por konsumi, por “ricevi servojn”, kaj eĉ ne imagas alian vivmanieron... Tial nia agado estas absolute, ĝisfunde fremda por ili, ili ne scias, ne interesiĝas kaj ne komprenas. Ekz., el kelkmil demandoj de la internacia ludo “Risko” apenaŭ troveblas deko, dediĉita al nia movado aŭ niaj eminentuloj. Kaj pri nia junulara movado SEJM, pri kanta kaj teatra amatora kulturo en nia lando oni simple ne scias ekster ĝiaj limoj. Ni ja ne rakontas, kaj tio kvazaŭ ne ekzistas...

Sed ja estis tia arda kultura agado! Kaj unu el ĝiaj gvidantoj, ĝiaj inspirantoj, unu el tiuj, kiuj ekbruligis kaj subtenis tiun flagradon, estis Jefim Zajdman.

Vere, li estis homo-flamo. Ĉio flagris kaj bolis ĉirkaŭ li. Li estis unika arta pedagogo, kvankam laŭ sia klero kaj profesio havis neniun rilaton al muziko aŭ teatro.

Gxuste li trovis, subtenis kaj promociis al “alta podio” Ĵomarton, Sorokan, Marinan Korotj, A. Radajev, Paulon Mojaev; li amikis kun Ljonja Borisov, Dina Lukjanec, Nina Djomuškina, K. Frolov, V. Ŝiŝkin kaj multaj, multaj aliaj. Kaj organizitaj de li “Veluraj Sezonoj” certe havis neniun analogon en la mondo. Tio estis veraj festoj de Esperanta kulturo, kien venis talentaj homoj el la tuta Sovetunio, kaj ne nur esperantistoj. Partoprenis teatroj kaj ensembloj el diversaj urboj, allogitaj de streĉa krea atmosfero; al tiuj “sezonoj” dediĉis siajn kantojn N. Berce, A. Radajev, M. Povorin k.m.a.

Estus bone, se ekzistus iom plena historio de nia arta kaj kultura agado; ne kiel seka tranombrado de okazaĵoj, sed kiel same arta prezento de brilaj eventoj kaj ardaĵ impresoj.

Jes, Jefim estis homo de tutmonda skalo (bedaŭrinde, ne konata tie, sed ni jam diris pri la kialoj). Sed li loĝis kaj vivis en Jalta, kaj en tiu urbo li estis sufiĉe fama. Li estis organizanto de la urba E-klubo “Tero”, aktiva aganto de turista klubo; preskaŭ ĝis la morto li gvidis E-ajn kursojn en la urbo. Li partoprenis ankaŭ en la klubo de barda kanto, kaj multaj bardoj eksciis pri Eo kaj kelkaj eĉ komencis kanti en ĝi...

Sed pri lia jalta agado pli bone rakontu jaltanoj; mi nur elmontris la ĉenon de plej helaj kaj reliefaĵ rememoroj pri li kaj lia rolo en la Esperanta vivo.



Informo

Ekde 2018 jaro REU lanĉas kulturan kaj beletran suplementon al sia Bulteno “Cerbe kaj kore”, la unuan numeron de kiu vi ricevas kune kun tiu ĉi numero de la Bulteno. Ni petas ĉiujn verkemulojn – poetojn, prozistojn, tradukistojn, literaturajn kritikistojn, esperantologojn kaj verkistojn de scienc-popularaj tekstoj – sendi siajn eventualajn kontribuojn al la adreso nikolao@yandex.ru.

La solaj kaŭzoj por rifuzo de publikigo de la verkoj povas esti 1) troa grandeco (romanon, eĉ genian, ni publikigi ne povos); 2) malalta lingva nivelo (korekti tro da gramatikaj eraroj estas ekster niaj eblecoj) kaj 3) verkoj kun nekomprenebla aŭ tro malbela stilo. Ĉio cetera aperos sen cenzuro (sed ne sen literatura redaktado!).

La suplementon aŭtomate ricevdos ĉiuj membroj de REU, kiuj ricevas REU-bultenon sen iu ajn aldona pago.

Estraro de REU

KOTIZOJ de REU por 2018

Laŭ Decido de la Estraro de REU de 25.10.2017

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto. Por iĝi membro de REU necesas nepre plenigi kaj sendi aliĝilon <http://reu.ru/aliĝo/eo> kaj pagi koncernan membran kotizon.

1. Individua kotizo – 250 rub. (por ekster-KŜŜ-anoj – 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (laŭpete REU sendas la materialojn ankaŭ per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

2. Dumviva kotizo - 20-oblo de la individua kotizo. La dumviva membro ricevas ĉion saman kiel la individua membro dum la tuta vivo.

3. Mecenata kotizo – ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. La mecenato ricevas ĉion saman kiel la individua membro plus danka mencio en la Bulteno kaj en la asocia retejo reu.ru.

4. Kolektiva kotizo - 200 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). La aliĝinta kolektivo ricevas membrokartojn (elektronikforme) por siaj aligitaj membroj, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn, voĉdonrajton por siaj aligitaj membroj dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

5. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo – 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage. Amikoj de REU ricevas rajton partopreni en REU-Konferenco sen voĉdonrajto, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Persono, sin anoncanta "amiko de REU", devas plenumi aliĝilon kaj menciisian ekzistantan retadreson.

PAGMANIEROJ

1. Per Sberbank. Al la banka karto **5469 3800 7074 4643**. Tion eblas fari senpere en bankoficejo, per Sberbank-Online, per bankaŭtomato kaj terminalo. <http://sberbank-sbrf.ru/karta-sberbanka/kak-perevesti-dengi-na-kartu-sberbanka-rossii.html>

2. Per Yandeks-Denjgi povas pagi al la monujo **41001363815184**, pagmanierojn vidu: <http://money.yandex.ru/prepaid/>

3. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas persone en Moskvo.

4. Per UEA-konto reua-p (precipe por eŭraj kotizoj).

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas retpoŝte aŭ telefone informi pri via pago** la kasiston (Aleksandr Lebedev, amikko@yandex.ru, telefonnumero 89853852181). Vi devas informi pri ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**

Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo

“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 28.01.2018